Joseph Freiherr von Eichendorff,

Pripensu!

tradukita de Manfredo Ratislavo

Birdet' en kaĝo, ankaŭ ĝi
Eksentas tremon ian,
Se la ekstera sunradi'
Orumas kradon ĝian.

Ke ankaŭ povas flugi vi,
Hometo, en libero,
Ĉu vi forgesis tion ĉi
En via korp-karcero?

Traduko de la Germana poemo "Gedenk!" de Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2008-10-27.*

MR-470-1 / Arg-480-931 (2008-10-27 11:04:29)